*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj*

**N-ro 4 (47)**

# FREŜO

**La marto 2017j**

*La retrevuo estos senpaga*
*nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin*

se sufiĉos

**2017 r.**



## Mi trovis por vi en TTT-ejo

saluton, kara Marian,
denove ege interesa revuo, bonege!
Ne rezignu pro kritikoj!
Daŭrigi la novelon pri Usono-Japanio!!!
Ne ĉio plaĉas al mi, pro tio mi respektas vian manieron.

**Kore, via Verner**
*Pfennig Werner - Germanio*

**Splendida numero, vera enciklopedio! Dankegon,**

***Bardhyl***
***Selimi Bardhyl, Albanio***

***Dankon kaj gratulon pro via valora laborego. Amike,***

***Luiza CAROL - Izraelo***

Tre estimata Marian,
eble vi jam ricevis (*tradukitan artikolon el la angla "Lingvo por idealistoj"*), tamen mi sendas, en la espero ke tio povas utili, kaj en Esperanto kaj en la itala lingvo.

Mi ŝatus ricevi vian "Freŝo" pri kiu mi vere gratulas.

***Romano Bolognesi***
***Italio***

Kara Marin,
La bildoj dioj estas tre bela leciono.
Mi ne sciis de la ekziston malsamecon inter la indiana kaj hindu dioj. Vero?
Dankon por sendi al mi multe da informoj esperante.
Brakumojn,

***MALACARNE Marcio - Brazilio***

*Estimata,*
*ne plu sendadu al mi tiun obscenecan revuon, subtenanta senmoralecon, kiu kondukas la homaron al neevitebla tragedio. Esploru vian konsciencon, ĉar Dio ekzistas, se vi volas eviti eternan damnon. Mi rekomendas kaj konsilas: Eluzu viajn kapablojn por verki ion pli noblan.*

***Miloslav Šváĉek - Ĉeĥio***

Mi petas vin, nepre sendi al mi la tradukitan artikolon. Mia filino parolas anglan kaj tralegis la artikolon, sed Esperanton shi nur komprenas. Mi estus tre dankema por la traduko en Esperanto cxar mi faras la bultenon de nia klubo kaj povus enmeti gxin en unu el venontaj numeroj.

***Katarina Eckstädt - Germanio***

Kara Samideano!
Mi ricevis informon, ke aperis nova numero de ,,Fresxo". Mi kun gxojo plu sendis tiun informon al aliaj gesamideanoj. **Poste**, kiam mi trarigardis la enhavon de la revuo mi kun granda honto konstatis, ke estas tre nemorala revuo. Pri tio atestas la kreskajxoj kaj iuj bildoj cxu alia enhavo. Mi jam sendis pardonpeton al miaj gekorespondantoj, cxar inter ili estis **virinoj kaj pastroj**. Bonvolu ne fari pere de Via eldonajxo kaj publikajxo malbonan opinion por Esperanto. Plej bone estu se tiu tiel, nomata ,,revuo" malaperu kaj tre rapide el esperantaj medioj. Ankau mi ne volas vidi, rigardi tiel ***malbonan, malbelan, malmoralan*** revuon.

Boguslavo
*Boguslaw Sobol - Pollando*

*Kara Marian,*
*Mi surprize ricevis vian revuon, cetere duoble mirindan. Unue pro la tre zorga gratulinda eldona prezento. Due ĉar, kiel psikologo, mi ne trovis plenkreskulon kiel eldonanto, sed eble adoleskanton. Mi pensadis pri via impresa insisto barakti rilate al sekso, kaj perceptis vian beadŭrindan miskomprenon pri ĉia religia ideo. Sendube vi ricevis pri Dio karikaturan bildon en via infaneco, Dion despotan kaj tiranan, kies plaĉo estas terurigi la naivulojn por ilin superregi.*
*La vera Dio, tamen, estas simpla kaj respektema rilate al la homaro, ne altrudas aŭ perfortas la homan liberecon. Li kreis la sekson kiel bela esprimo de amo, ne kiel aĉa manifestado de senbrida pasio.*
*Mi senpretende skribis ĉi liniojn en la espero ke vi utiligos vian rimarkindan eldonan kapablon laŭ pli konstruiga vojo. Ĉu vi iam interesiĝis eksperti ion alian?*

*Amike,* ***Milton, el Brazilo.***

*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj*

# FREŜO

N-ro 4 (47)

La marto 2017j

La retrevuo estos senpaga nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin

Marzec 2017



## N-ro 4 / (47)

*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*

*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

Se vi volus elŝuti antaŭajn numerojn de "FREŜO"
kaj kontroli nombron da elŝutoj ĝis nun
kaj spekti el kiuj landoj
musklaku unu el subajn ligilojn
aŭ engluu en la ĝustan lokon en retumilo

**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TNJo7O/all_time**
**https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TnY1zj/all_time**

FREŜO nr: 1/44 **https://goo.gl/TNJo7O**
*(ĝis hodiaŭ - 700 elŝutoj)*
FREŜO nr: 2/45 **https://goo.gl/TnY1zj**
*(ĝis hodiaŭ - 700 elŝutoj)*
---------------------------

*Se vi havus proponojn, materialojn por la venonta numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Adam FRENSZKOWSKI*
*Franciszek WITUCKI*
*Andrzej GIELERT*
*Mirka KUBICKA*

Recenzoj:
pri "FREŜO" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**

*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*


*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso:* fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**

*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-aranĝo !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*

**TITOLPAĜO**
*- Kio estas kompromiso ?*
*- Geedzeco al virino kun grandaj mamoj kiu ne scipovas kuiri.*
















## Al la ĉefredaktoro skribas:

*Kara,*
*ŝajnas ke vi ne komprenas la aferon.*
*Mi donos similan ekzemplon, kaj fermos la aferon.*
*Ekzemple, vi ion diras al mi en normala mesaĝo.*
*Normala mesaĝo estas privata mesaĝo.*
*Pro miloj da motivoj eble vi ne volas ke mi publikigu kion vi diris al mi private.*
*Do, mi ne rajtas uzi tiujn tekstojn en publika revuo sen via konsento.*
*Ĉu tio por vi estas tiel stranga?*
*Mi tuj diru al vi: mi ne konsentas ke mia nomo kaj tekstoj aperu ie ajn sen mia antaŭa skribita permeso, kaj <u>mi certas</u>, ke **plej granda parto de la homoj pensas kiel mi.** Eĉ se miaj pensoj estas precize egalaj al la viaj pri iu afero.*
*Sincere, Marian, se vi ne komprenas ĉi tion, vi ne estas en bona kondiĉo por eldoni revuon.*
*Temas pri la unuopa rajto je sia nomo kaj vortoj.*

***Via legantino***

===

Mi publikigas supran tekston de unu el miaj legantinoj kaj ĉeokaze mi havas multajn demandojn. Ne nur al ŝi - sed al ĉiuj miaj gelegantoj (ĝis nun mi havas preskaŭ 1.000).

***- Ĉu mi ĉiam devas peti "permeson" por aperi mesaĝon de gelegantoj?***

***- Ĉu ĉiam la gelegantoj devas kunsendi "permeson" kun mesaĝoj, se ili konsentiĝas publikigi ?***

***- Se ili ne sendos "permeson" mi malrajtas publikigi iliajn mesaĝojn?***

***- Ĉu estas normala afero, ke ni alimeniere pensas private kaj alie pensas publike?***

***- Ĉu estas normale pensi ion kaj emfazi laŭte (voĉe) alion?***

***- <u>Ĉu por ni (por modernaj homoj) ĉi tiu dupensado</u> <u>estas devigita</u>? - kiel en la libro de Orwell sub la titolo "La jaro 1984"...***

***- Ĉu niaj privataj pensoj (kaj agoj) estas tiom hontindaj, ke ni hontas ilin ?***

*Via Ĉefredaktoro*

# Multi-kulti-POLITIKO














## Svedia estraro pagis por enmig-rantoj po 15 mil usonaj dolaroj pro la seksperforto al virino.


Tio ne estas morna ŝerco. Islamana enmigranto el Erytreo, kiu brutale seksperfortis kun sia kolegoj la svedinon, ricevis de ŝtato rekompencon 140.000 kronoj. Baldaŭ ricevos ĝin ankaŭ ceteraj viroj.

Malgraŭ, ke sveda tribunalo verdiktis, ke la viro seksperfortis, tamen - kiel oni difinis - „li estis pli pasiva" ol ceteraj tri seksperfortuloj. Pro tio li povas ricevi de la ŝtato rekompencon je valoro 15.000 usonaj dolaroj pro „traŭmo, kiu li travivis en sveda malliberejo". Kompreneble ĉio el la poŝo lokaj impostpagantoj.

La ceteraj tri seksperfortuloj ankaŭ havas feliĉon, malgraŭ tio ke juĝejo kondamnis ilin komence je 3 jaroj en prizono, sed Apelacia Tribunalo malvalidigis tiun verdikton, ĉar „oni ne povas fiksigi, kiu precize kion faris dum seksperforto" , pro tio oni povas kondamni neniun.

**Efike – ankaŭ ceteraj seksperfortuloj eliris al libereco kaj ankaŭ ricevos baldaŭ rekompencon.**

**Gratulon, Svedio !**



Kristnaska arbo laŭ Multi-kulti

**Kara Francio, Kara Germanio,**

Tiel prezentos via ĉijara Kristnaskarbo



*La berlina polico komencis enketon de oficisto, kiu aperigis en interreto filmeton, kiun registris la stratkamerao, montranta atakon por la hazarda virino fare de imigranto. Ni rememoru, ke kamerao registris tion ĉe la nmetroostacio Hermannstrasse en Berlino la 27-an de oktobro 2016.*

*La piedbatita sur dorson la 26-jara virino falis ek 13 ŝtupoj. Tamen dum preskaŭ unu monato kaj duono polico ne nur ne trovis atakanton sed eĉ ne komencis enketadon en tiu afero! Fine – probable por devigi policon ekagi – unu el oficistoj aperigis tiun filmeton en interreto antaŭ unu semajno. Nur tiam – la 9-an de decembro - oni komencis enketon. Tamen evidentiĝas, ke por la polico plej grava nun afero estas kapti tiun, kiu vidigis la filmeton. Repezentanto de la berlina polico Winfried Wenzer informis, ke polico nun enke-tas pri la afero, kiu publikigis la filmeton – ĉu laboranto de la metroa linio BVG, ĉu iu el la policistoj.*




*Loĝantoj de la urbeto Fryburg ne povas forgesi la morton de 19-jaraĝa Maria, filino de altranga unia oficisto. En oktobro medicina studentino, (kaj samtempe volontulino en centro por migrantoj) estis seksperfortita, kaj poste dronmortigita en rivero far de 17-jaraĝa migranto el Afganistano. Pro tio, ke knabo estas neplenaĝa, minacas al li maksimume ĝis dek jarojn de mallibrejo. 19–jaraĝa Mario - estis filino de dr. Clemenso Ladenburger, altrangulo en Jurservado de Europa Komisiono. Korpo de la knabino oni trovis la 16-an de oktobro en la rivero Dreisam en Fryburgo. La knabino estis ekatakinta la 15-an de oktobro, kiam ŝi reveturis per biciklo el arangô. Agresanto antaŭe seksperfortigis ŝin, kaj poste dronmortigis en rivero – raportas germana Bild. Ankoraŭ oni ne scias ĉu tiu enmigranto konis sian viktimon.*




En Tuluzo policistino estis mortpikita kolon far de Alĝeriano. Eble oni klarigos, ke li estis mens-malsana, sed ni pripensu ĉu ĝuste la religio ne alkondukas al similaj rezultoj.



Jen estas mia imago de teroristoj…
kiam ili eksciis, ke Eŭropo decidis batali kun ili per:
toleremo, kantoj, floroj, dancoj, alvokoj,
per vortoj de maltrankviliĝo kaj bedaŭro,
kaj per koloraj krajonoj

# Lingvo por idealistoj

**Video prezentas etan knabon.La dolĉvizaĝa infano atende fiksrigardas la telekameraon. *"Kie estas via nazo?"* - demandas eksterekrana plenkreska voĉo. *"Nazo."* la knabeto ripetas, aldirektante dikan montrofingron flanken de sia nazo.**

Alia video ĉerpita el YouTube, montras ion rimarkindan: usona infano fariĝanta denaska E-parolanto - lingvo inventita antaŭ 130 jaroj de pola-juda okulkuracisto pro idealisma misio ripari rompitan mondon.

Alterne brakumata kaj mokata, persekutata kaj ignorata, Esperanto obstine pluvivis, kaj hodiaŭ ĝi estas parolata de internacia komunumo kies membroj estas ĉie ajn, taksataj de dekmiloj ĝis 2 milionoj. La esperantistoj malfermas siajn hejmojn al vojaĝantaj E-parolantoj kaj miksiĝas en konvencioj, kie ili survestas sin verdkolore, kantas la Esperantan himnon ("La Espero"), aĉetas E-seksomanlibrojn kaj Ŝekspir-tradukojn kaj dividas nutraĵojn kaj kulturojn de siaj denaskaj landoj. Kaj kelkaj el ili edukas denaskulojn - t.e. infanoj aŭ genepoj denaske parolantaj en Esperanto.

*"Vi estas en la ĉambro, kie ĉeestas iu el Nepalo kaj iu el Kubo kaj iu el Ĉinio kaj iu el Japanio kaj iu el Indonezio, kaj ili ĉiuj parolas Esperanton kaj trinkas moĵitoson,"* diras profesorino Esther Schor de la angla ĉe Princeton-Universitato, kies historia memorlibro, "**Ponto de Vortoj: Esperanto kaj la Sonĝo de Universala Lingvo**" estis eldonita lastaŭtune. *"Estas ĝuste ia mirinda sento."*

<u>Esperanto estis kreaĵo de Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917),</u> kiu naskiĝis en la multlingva urbo Bjalistoko, en Rusa-kontrolita Pollando, kie judoj, poloj, germanoj kaj rusoj vivis en reciproka malamikeco. Ekde liaj dekaĝulaj jaroj, la lingve talenta Zamenhof revis elpensi novan lingvon, kiu transpontus etnajn kaj naciajn diferencojn - ne anstataŭigante denaskajn lingvojn, sed fariĝante universale interkonsentitan duan lingvon por ĉiuj mondaj popoloj.

*"La projekto ne estis tiel donkiĥota kiel ĝi sonas",* diras la profesoro pri historio ĉe Princeton-Universitato, Michael D. Gordin, kies libro je 2015 **"Scienca Babelo"** ekzamenas kiel la angla anstataŭis antaŭulojn kiel la latinan, la francan, la germanan kaj la rusan kaj fariĝis la ĉefa lingvo de sciencaj publikigadoj. Tiutempe Zamenhof evoluigis siajn ideojn, sciencistoj komencis maltrankviliĝi, ĉar gravaj malkovroj povus esti preteratentitaj se esploristoj ne povus kompreni la lingvojn en kiuj ili estis eldonitaj. Neŭtrala "planlingvo", mallonga cirkvito de la eŭropaj nacioj kiuj manovris por lingva dominado, ŝajnis kiel farebla solvo.

"*Ne estis aro de stranguloj,*" Gordin diras. *"Tio estis ĉiam marĝena movado, sed estis serioza movado, kiun seriozaj homoj prenis serioze. Estis gravaĵo, kiel la Esperantistoj dirus."*

En 1887, Zamenhof - ekde tiam trejnita okulkuracisto, kiu poste praktikis inter la malriĉaj judaj civitanoj de Varsovio - rivelis sian novan lingvon en pamfleto eldonita en la rusa sub la pseŭdonimo **"Doktoro Esperanto".** La fondinta dokumenton, kiun la esperantistoj nomas la **"Unua Libro"**, prezentis la 16 fundamentajn principojn kaj listigis 900 prefiksojn, sufiksojn, kaj vortoradikojn, sed lasis la plimulton de la laboro de vortprovizo-konstruado al la lingvo-uzantoj.


Por igi sian novan lingvon facile regebla Zamenhof eliminis la neregulajn verbojn kajn arbitre genrajn substantivojn, kiuj turmentas la lingvajn lernantojn. La Espe-rantaj radikoj estas ĉerpitaj el la germana, la angla, la rusa kaj precipe de la latinidaj lingvoj; plej multaj el liaj konjunkcioj kaj eroj venas de la latina kaj greka. Ĉiu unuopa substantivo finiĝas per "o", ĉiu plurala substantivo finiĝas per "oj" (prononcita kiel la angla "oy"), ĉiu adjektivo finiĝas per "a", kaj ĉiu adverbo finiĝas per "e." Multaj komunaj adjektivoj kiel “bona’ povas esti transformitaj en ilia kontraŭo aldonante la prefikson mal- (malbona), duonigante la vortprovizon kiun la lernantoj devas enmemorigi. Novaj vortoj estas forĝitaj per la kunmeto de radikoj kaj afiksoj.


La parolata Esperanto sonas iom kiel slava-aspergita itala, kaj kun neniu etna aŭ nacia komunumo insisti por ricevis elparolon, ĉiu parolanto alfrontas la lingvon per individua akcento derivita de sia propra denaska lingvo. La skribita Esperanto aspektas duonfamiliara al angla parolanto, eĉ sen antaŭa kono de la lingvo.

Kiam Luke Massa, studento pri filozofio de Princeton kiu nun laboras kiel softvara inĝeniero, volis havi sekretan lingvon por povi paroli kun amiko en sia antaŭurba Filadelfia mezlernejo, Esperanto ŝajnis la perfekta elekto. *"Post **kvar monatoj** de en-reta studado kaj konversacio, ambaŭ amikoj estis pli kompetentaj en Esperanto ol en la germana kiujn ili oni studis **dum jaroj** en lernejo*" - Massa diras.

Kiel ilo por sekretaj koridoraj onidiraĵoj Esperanto falis. *"Ĝi vere estas ia malsukceso kiel sekreta lingvo, ĉar estas tiom da vortoj en ĝi, kiuj estas similaj en la angla aŭ en la franca,"* Massa diras. *"La homoj povus komprenii ĝin."*


Vivante inter la interetnaj streĉiĝoj de la komenco de la 20-a jarcento en Orienta Eŭropo, Zamenhof havis pli altajn celojn por sia projekto, kiu baldaŭ estis konata per sia pseŭdonimo. *"Li revis pri lingvo kiel ilo por konstrui ion, kiun li ne havis,"* diras











al la paĝo 7

# Ĉu vi scias, ke...














Ĉu vi scias ke la naĝbasenoj
en la ŝipo "Titanic" ĝis hodiaŭ estas plenaj?



Pollando estas la unusola lando
kiu konkeris Moskvon. Ne sukcesis
tion eĉ Hitlero kaj Napoleono

Ĉu vi divenos kio estas en la foto?



**fingroringoj de holokaŭsto-viktimoj**



Laŭ la nazioj - Indianoj apartenis al la aria raso




Provinco Alberto en Kanado estas la plej granda
loĝ-teritorio kie estas neniuj ratoj.
Ĉiujare eniras tien ĉirkaŭ 12 ratojn,
sed estas rapide mortigitaj de specialaj (sanitaraj)
servoj, antaŭ ol ili komencas multgeneriĝi.



Por infanoj sub unu jaro de aĝo ne devus
esti donita mielo ĉar ĝi povas disvolvi
infanan toksiĝon de botulismo



En Kubo ekzistas neniu problemo kun amasmortigo de
abeloj. Embargo trudita al tiu lando koncernis, interalie
insekticidoj, kies uzo minacis por abeloj. Mielo estas
nun la kvara plej grava varo eksportita de Kubo



En Japanio (1997) oni emisiis bildstrian filmon
"Pokemon" en kiu aperis sceno kun intensaj
ekbriloj kiuj kaŭzis amasan atakon de epilepsio
ĉe infanoj en la tuta lando. La incidento estis
raportita en naciaj novaĵoservoj, kiu ankaŭ
entenis menciitan scenon, kondukante denove al
la sekva ondo de atakoj.

Carolyn Biltoft , Princeton historio Ph.D. kies venonta libro pri la intermilita Ligo de Nacioj inkludas ĉapitron pri la movadoj por lingvo-reformo kaj lingvo-kreado. *"Li opiniis ke lingvo povus esti ilo por atingi transliman koncepton de paca komunumo."*

Dum la jardekoj post la publikigo de la "Unua Libro", Esperanto akiris adeptojn kaj suferis kreskantan problemon. La judeco de Zamenhof forpuŝis iujn fruajn esperantistojn, precipe post kiam li kodigis sian universalistan vizion en religia filozofio, fine nomita ***Homaranismo***, bazita sur la etikaj instruoj de la juda saĝulo Hillel. En 1907, Esperanto alfrontis ĝian plej gravan defion kiam konferenco kiu estis kunvenigita por elekti internacian helplingvon de-inter dudekkvar kunkurantoj, gajnis sur la Zamenhofa Esperanto, la ĉefa defianto la formita Esperanto konata kiel Ido. En la rezultinta laŭtkverelo, eble kvarono de la Esperanto-gvidantoj, sed nur malgranda procento inter la vicoj de la uzantoj, transfuĝis al la nova lingvo, kiu svenis en malpli ol jardeko.

Dum la eŭropa nacionalismo kondukis al la monda milito kaj revolucio, la Esperanta utopiismo frekvente inspirigis malamikecon, kiel la libro de Schor montras. (Esperanta historio de la movado, post nelonge eldonota en la angla, estas titolita **"La danĝera lingvo"**). La Esperantistoj - kiuj, kiel Gordin atentigas, estis ofte implikitaj en aliaj formoj de socia aŭ politika aktivismo, de vegetaranismo al pacifismo - estis persekutitaj de Stalino kaj de la nazioj; ĉiuj tri plenkreskaj gefiloj de Zamenhof mortis en la holokaŭsto. La penadoj por igi Esperanton unu el la oficialaj lingvoj de la Ligo de Nacioj kolapsis. Dum debato en 1922, brazila delegito difinis Esperanton kiel la lingvo de "*sentaŭguloj kaj komunistoj.*"

En momento kiam registaroj dislokigis la lingvo kiel ilo de propagando kaj militado, Esperanto celis "*subfosi la potencajn strukturojn enigitaj en la lingvo,*" diras Biltoft, asistanta Profesoro de internacia historio ĉe la Supera Instituto pri Internaciaj kaj Evoluaj Studoj en Ĝenevo. *"Ĝi moviĝis kontraŭ la la koro de la fortoj, kiuj pli uzas komunikadajn teknologiojn kaj standardizitajn lingvojn en perforta maniero por plifirmigi la potencon."*

*"Post la 2-a mondmilito Orienta Eŭropo, brakumante Esperanton disponigis manieron por disidentoj starigi ligojn al la okcidento, tra esperantistoj kaj iliaj organizoj, kaj esprimi "trankvilan reziston" al siaj reĝimoj*" - Schor diras. Sed Gordin notas ke iuj komunismaj reĝimoj aktive promociis Es peranton tiel, vidante ĝin kiel metodo por siaj popoloj komuniki kun aliaj en la orienta bloko. La esperantistoj ŝatas por-treti sin kiel konfliktantajn disidentojn *"ĉar tio donas ian heroecon al la historio,*" li diras. *"Kaj estas multe da heroismo sen devo doni kialojn."*

Kio ajn estis en la eŭropa situacio, almenaŭ unu institucio de la Malvarma Milito certe asociis Esperanton kun komunismo: la usona armeo, kiu uzis Esperanton kiel la lingvo de fikcia malamiko nomata "Agresanto" en trejna ekzerco uzita de 1947 ĝis 1967. *"En la Zamenhofa lingvo de paco, egaleco kaj monda harmonio, la Armeo projektis sian timon - kaj abomenon – kontraŭ komunista agreso"* Schor skribas. (Ironie, dum la sama periodo, la usona esperantista movado estis retirita pro la klopodoj de McCarthy por senmaskigi la supozitajn komunistajn enfiltritulojn).

*"Kvankam la esperantistoj ŝatas pensi pri si kiel politike neŭtralaj, la kontraŭkultura antaŭenpuŝo de la lingvo estas politike signifoplena"* - Schor argumentas. Esperanto *"simbolis alternativon al la donita situacio, kaj certe alternativon al totalismo, alternativon al subpremo kaj fanatikeco kaj al milito,"* ŝi diras. *"Ĝi ne estas partia, sed mi opinias ke ĝi estas profunde enigita en la politika homa naturo."*

En sia opoziciema naturo, Esperanto malsamas radikale de la angla, kiu hodiaŭ funkcias kiel fakta internacia lingvo, plenumante iujn funkciojn, kiujn Zamenhof iam antaŭvidis por Esperanto. *"La angla, kiu tutmonde disvastiĝis per la imperia potenco de Britio kaj la ekonomia forto de Usono, estas malproksime de la paca, neŭtrala ilo kiun Zamenhof imagis*" - Schor diras.

*"Ekzistas historio de potenco malantaŭ ĝi, kaj tio estas kion Esperanto evitas,"* Schor diras. *"Esperanto ne estas lingvo promociita de potenco. Ĝi estas lingvo promociita de konvinko, por amo, por idealismo."*

Kiel gimnaziano en Barato, Avaneesh Narla estis allogita al Esperanto parte pro lia ĉagreniĝo ĉe la postkolonia persisto de la lingvo de la britaj koloniistoj. *"Mi malamis la fakton ke ĉiuj lernis la anglan,"* diras Narla, grava fizikisto kiu parolas ses lingvojn, sed diras ke li ankoraŭ ne parolas bone en Esperanto, lia sepa. *"Kial ni ne povas simple lerni Esperanton? Mi tre ŝatis la ideon."*

En angla-centrigita mondo, angle parolantaj denaskuloj havas superecon super tiu





















*Esploroj pruvas, ke inter ĉiuj varioj de seksumado - la absoluta numero UNU ĉe aliseksemaj (malgejaj) viroj estas buŝa seksumado fare de virino.*



***Fatafehi Paulah** estis reĝo de Tongo en la jaroj 1770-1784. Li donis al si mem rajton disvirgecigi ĉiun virgulinon en la regno. Li seksumadis kun ĉ. 10 virgulinoj tage kaj dum tuta regado disvirgecigis 37800 knabinojn.*



*Seksumado povas rapide plibonigi la sanon kaj rehavigi forton*



*Plimulto da "knaboj" havas molan penison dum la unua seksuniĝo*



*Spermo povas esti uzata kiel kuracilo kontraŭ hautfaltoj*



*Multaj virinoj povas atingi orgasmon pere de stimulado de mampintoj*



*Por orgasmo respondecas la sama parto de cerbo, kiu respondecas por sento de maltrankvilo kaj timo.*



*Ĉe plimulto da virinoj libido multe pli malboniĝas antaŭ menstruo*



uj, kiuj akiras la anglan poste - propra maljusteco kiu tedas Alice Frederik, teksasa studentino pri antropologio, kiu skribas sian doktoriĝan tezon pri la nuntempa Esperantista komunumo. *"Kio mi ŝatas en Esperanto, ke ĝi vere forigas mian privilegion kiel denaska anglalingvano,"* diras Frederick, kiuj lernis la lingvon por partopreni internaciajn Esperanto-konferencoj kaj konsulti la arkivojn de UEA lokita en Nederlando. *"Estis kvazaŭ la situacio subite renversiĝis sur min. Mi estis devigata lerni ĉi tiun lingvon se mi volis esti 'en' la komunumo, kaj mi neniam havis tiun sperton antaŭe."*

La fakto ke preskaŭ ĉiuj esperantistoj ekestas kiel lernantoj de dua lingvo - la lingvaj denaskuloj restas malgranda malplimulto, nombre eble 1.000 homoj, Gordin taksas - helpis forĝi esperantistojn en amika, bonveniganta komunumo. Dum jardekoj, la esperantistoj subtenis **Pasportan Servon**, nomlisto de Esperantistoj ĉirkaŭ la mondo, kiuj pretas gastigi samideanojn por unu nokto aŭ du. Massa, (la 2013 Princeton diplomiĝinto), neniam uzis la servon, sed kiam li vojaĝas, li surmetas esperantan signon - verdan kvinpintan stelon - por anonci sin al ajna esperantisto, kiun li eble renkontos (sen bonŝanco ĝis nun). *"Estas io por mi, por rememorigi min pri kio mi pensas pri lingvoj kaj vojaĝado kaj la mondo,"* Massa diras.

Schor aliĝis al Esperantujo en 2007-08, ne longe post la eldono de biografio pri la 19-jarcenta amerika juda poetino Emma Lazarus. Kiel ŝi engaĝiĝis por nova projekto, ŝi konsideris *"ceterajn Judoj, kiuj pensas ekster la skatolo"* kaj memoris ke ŝi aŭdis pri Zamenhof.

Dum sia esplorado, Schor engaĝiĝis en trisemajna intensa E-lernokurso en San Diego; ĉeestis E-konferencojn en Turkio, Vjetnamio, Kubo kaj Pollando; trafoliumis kleran hungara-esperantan seksogvidilon; vizitis lernejon kaj adopthejmon prizorgata fare de esperantistoj en kampara Brazilo; kaj pasigis interparolan tagon en Uzbekio kun la Esperanto-parolanta direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco en Samarkando.

*"La Zamenhofa reala vido, mi opinias, ne estas la lingvo mem, sed estas ke vi ne povas havi lingvon sen parolantaro,"* diras Gordin, la Princeton-historiinstruisto. *"Konstruante la lingvon, li ankaŭ konstruis la komunumon de la parolantoj."*

Kaj por legantoj: Zamenhof mem tradukis Hamleton kaj la hebrean Biblion en Esperanton, kaj hodiaŭ estas eble legi esperantlingvajn versiojn de ĉio de "Infero" de Dante al "Sinjoro de la Ringoj" de Tolkien, tiel kiel originalajn verkojn en prozo kaj poezio. Schor, ŝi mem eldonita poetino, provis traduki Elizabeth Bishop en Esperanton (verdikto: ne facila).

En la reto, hodiaŭ malproksimaj esperantistoj povas studi senpage tra la retejo de Lernu! (www.lernu.net), kiu raportas 200.000 registritaj uzantoj, aŭ helpe de la lingvo-lernada retejo Duolingo, kie frekventas 569.000 studentojn de Esperanto. La esperantistoj povas serĉi informojn en Vikipedio, renkontiĝi en retaj forumoj por debati la plej taŭgan esperantan formon por terminoj kiel "smartphone" kaj "flash drive," aŭ viziti YouTube por rigardi klipojn de E-rokbandoj kaj plenlonga (kvankam subtitolita) versio de unu el iuj mondaj tutesperantaj filmoj, la horora filmo "Inkubo" (Incubus), el 1966, ĉefrolita de pra-Startrekulo William Shatner.


Malgraŭ tiu floranta kulturo, tamen Esperanto ĉiam renkontadis grandan miskomprenon kaj mokadon. En 1908, Theodore W. Hunt, la unua prezidanto de la angla fako de Princeton, diris ĉe renkontiĝo de la Moderna Lingva Asocio ke planlingvoj kiel Esperanto "neniam povas leviĝi al la rango de lingvo kiel esprimo de la penso por la plej altaj celoj." (Almenaŭ unu el liaj Princeton kolegoj malkonsentis: Kelkajn jarojn pli frue , George Macloskie, emerita profesoro pri biologio tradukis la Evangelion laŭ Mateo en Esperanton). Jarcenton poste, malfru-nokta televido gastiganto Stephen Colbert ĉeestis la 2014 Komika-Trompo maskitaj kiel Princo Hawkcat, supozeble la stelo de "la plej populara homaj-besto fantazia libera híbrido iam ajn montrita" - rigardu ĝin - "en Esperanto."

Komence de tiu ĉi jaro, Frederick, la elstara supera antropologo, subite hirtiĝis kiam instruisto ŝerce komparis Esperanton al Klingon, la lingvo de la malbonaj eksterteranoj en Star Trek - lingvo inventita por servi la celojn de komerca distro, ne utopian idealismon. "*Mi tuj volis saltleviĝi"* Frederick diras. *"Mi tenis mian buŝon fermita, sed tio frapis al mi kiel io kiun la esperantistoj povus nomi ofendego."*

De tempo al tempo, Massa estis devigata defendi Esperanton de la kritiko aŭ mokaĵo dum la manĝohoro de la kunstudantoj preterpasantaj la ne tro vizitatan Esperanto-tabulon kiun li fondis en Rockefeller Kolegio. Esperanto estas *"la afero pri kiu mi estas la plej neracia en mia vivo,"* Massa diras. *"Mi defendos ĝin por ĉiam, kaj mi scias ke mi pretas tuj fari tion."*

Esperanto altiras malestimon parte pro la propra naturo de projekto. *"Jen stulta*














# N A C I O J











Nacieco de Amoro?

Kompreneble:
la rusa.

Li kuras armigita
sed kun nuda postaĵo,
ekpafas al homoj kaj
diras, ke pro amo.






Montriloj de horloĝo situata sur konstruaĵo de bolivia parlamentejo iras kontraŭe ol kutime. Bolivia registaro instigas tiamaniere loĝantaron de sia lando pridubi ekzistantan realecon kaj esti kreivaj.





Ĉiuj en la Norda Koreio havas eblecon voĉdoni por alia kandidato ol la oficiala. Sufiĉas ke voĉdonanto eliros el la voĉdonĉambreto, staros antaŭ la voĉdonkomisiono kaj sur la balotil-karteto skribos nomon de sia kandidato.




Zono ĉirkaŭ nuklea reaktoro
en Ĉernobilo **ne taŭgos**
por loĝado dum venontaj 20 mil




*Oficiala mono en Zimbabvo estas la ĉina juano. Oni rezignis de propra valuto (zimbabva dolaro) en la jaro 2009 – pro la freneza inflacio kiu atingis 500 miliardoj da procentoj.*




Eksportaĵo de Nord-Koreujo estas statuoj de diktatoroj, kiu havas serĉatecegon precipe en afrikanlandoj.

Kie estas ĉi tiu restoracio ?







*Monumento de Ĉingis-Ĥano en Mongolio estas 30-metrojn alta. Por konstrui ĝin oni uzis ĉirkaŭ 250 tunojn da ŝtalo. Sur la kapo de ĉevalo troviĝas belvedero, kiun oni atingas per lifto situanta en la ĉevala vosto, kaj en la bazo de monumento estas muzeo kaj restoracio. La monumento troviĝas en la urbo Tsonjin, 54 km oriente de Ulan Batoro.*

*nocio ke ĉar ĝi estas elpensita lingvo, ĝi ne povas esti reala,"* diras David Bellos, profesoro en Princeton pri kompara literaturo kaj ĉe franca kaj ĉe itala fakoj, kiu aranĝis ĉiutagan E-lecionojn por siaj studentoj kaj instruis dum ses-tutsemajna tutmonda seminario pri multlingvismo, okazinta en Ĝenevo, dum somero de la 2014j. *"Se vi haltas pensi pri tio, plejmultaj lingvoj estis inventita ĉe iu punkto. Kiam ili estis inventitaj - vere ne estas rilato "ĉu" aŭ "ne" ili povas utili en la funkcioj pri kiuj vi volas lingvon por ĝia utiligo."*

La serioza idealismo de Esperanto ankaŭ elmetas ĝin al atakoj la plej cinikaj. Zamenhof elkore akceptis la nocion de interna ideo, pli altan celon de sia nova lingvo estis dediĉita, kaj eĉ hodiaŭ, la esperantistoj nomas sin reciproke ***"samideanoj"***.

Kion reprezentas tiu ideo ĝenerale, oni ne povas kompreni tuj. Kun la paso de jaroj, la sugestoj de akademiuloj, movadgvidantoj kaj ordinaraj esperantistoj inkluzivis ne nur la *Zamenhofan Homaranismon*, sed ankaŭ pacon, socian justecon, lingvan justecon, interetnan harmonion, kontraŭnaciismon, kaj anti-faŝismon. Ne temas ke la esperantistoj devas adoptii ajnan internan ideon. *"Eblas aliri Esperanton kaj uzi ĝin sen senti ke vi devas fariĝi vagabondo, longhara, paculo vestite per sandaloj",* diras Bellos. *"Temas pri kiel oni povas mildigi la malfacilaĵojn de la mondo havante komunan interlingvon."*

Narla, kiu instruis Esperanton per mallongaj kursoj por lokaj gimnazianoj kaj samrangaj Princeton studentoj dum la vintra sesio, kredas ke la estonto de Esperanto povas kuŝi en ĝia utileco kiel ilo por antaŭenigi la akiron de dua lingvo. En Britio, malgranda programo nomata "Springboard to Languages" (Salttabulo al lingvoj); asertas ke infanoj je lerneja aĝo, kiuj eksponedas pli frue travideblan Esperanton, regulan gramatikon, akiras konojn kaj strukturajn bazojn - same kiel lernado la notadon preparas la muzikajn studentojn ludi pli komplikitajn instrumentojn. *"**La Franco** en la klasĉambro estas fagoto,"* la kreinto de Springboard, Tim Morley, argumentas en la jaro 2012 dum TEDx parolado. *"Esperanto estas notado."*

Tiaj modestaj celoj ŝajnas malproksimaj de la Zamenhofa vizio de la fina venko - mondo parolanta Esperanton. Nuntempe lia ambicio ŝajnas pli malproksima ol iam ajn, kaj rimarki, eventuale, eble eĉ ne dezirinda, sugestas Frederick, la elstara antropologisto. " Esperanto estas speco de ligilo ĉimaniere" ŝi diras. *"Kaj ĝi volas fariĝi la dua lingvo por la mondo, sed por fari tion, ĝi finfine devas fariĝi tiel grandega, ke la homoj sentus la devigon lerni ĝin, kaj se ili ne farus tion, ili sentus sin malvenkintaj. Esperanto iĝus investita per tiu povo, kiun ĝi vere klopodis eviti havi. Ĝi povas aspiri esti kiel la angla, sed mi pensas ke ĝi ankaŭ perdus iun pecon de mem se ĝi farus tion."*

En ajna kazo, Schor diras, la esperantistoj ne plu kredas je tiu ĉi aspekto de la Zamenhofa revo. *"Finvenkismo finiĝis, ne plu ekzistas*" ŝi diras. *"Neniu pensas ke tio okazos."*

*"Ne tiom rapide*" diras Bellos, ŝia Princetona kolego. *"Nuntempe, la angla estas firme protektata kiel internacia lingvo*" li diras *"sed iam, same estis la sumera, la antikva greka, la latina, kaj la franca".*

*"Laŭ la fluo de la homa historio, **neniu centra lingvo iam restis centra por pli ol kelkaj jarcentoj,***" Bellos diras. *"Io ŝanĝos iun tagon. Esperanto estas perfekte racia projekto, kaj la homoj povas veni al ĝi. Mi kredas ke estas tute antaŭtempe diri ke ĝi maltrafis la boaton."*

**Debora Yaffe estas liberlabora verkistino loĝanta en Princeton Junction, N.J. Ŝia plej lastatempa libro estas Inter la Janeites: Vojaĝo tra la mondo de la fervoruoj de Jane Austen.**

Esperantigis Romano Bolognesi


kaj Bardhyl Selimi













KRAFT
Nestlé
Coca-Cola
Yum!
Cadbury
GLACÉAU
DR PEPPER SNAPPLE
WONKA
L'ORÉAL
Pringles
$$$
Spin-off
$$$ (30%)
(Parfums)
A&W Welch's Sunkist Canada Dry Snapple Dr Pepper Squirt Schweppes Orangina Mott's Hawaiian Punch ReaLemon Crush Clamato
Trident Clorets Dentyne Stride Halls Bubblicious Chiclets Certs
Allan Sour Patch Maynards Crispy Crunch Trebor Twirl Caramilk Crunchie
Kraft Dinner Stove Top Shake 'n Bake Magic Baking Powder Oscar Mayer Polly-O Claussen Mr. Christie's Honey Maid
Oreo David Teddy Grahams LU Fudgee-O Fig Newtons Chips Ahoy!
vitaminwater smartwater
Côte d'Or Carte Noire Toblerone Milka Terry's Chocolate Orange Baker's
Coca-Cola Sprite Mezzo Mix Minute Maid Fruitopia Five Alive Barq's Fanta Nestea Mello Yello Monster Powerade Dasani Full Throttle
Rockstar Mirinda Brisk Mug Mtn Dew Aquafina Lipton Tropicana pepsi
A&W East Side Mario's KFC Taco Bell Pizza Hut
Velveeta P'tit Québec Kraft Singles Philadelphia Cracker Barrel Simmenthal
Kool-Aid Del Monte Capri-Sun Tang Crystal Light Mr. Freeze
Planters Triscuit Premium SnackWell's Cheese Nips Wheat Thins Ritz Club Social
Maxwell House Nabob Kenco Jacobs
Mayo Miracle Whip Jell-O Bull's-Eye Handi-Snacks Cheez Whiz Cool Whip A1
Perrier Nestea S.Pellegrino Poland Spring Nestlé Pure Life Vittel
Nescafé Taster's Choice Coffee-mate Nespresso
KitKat Aero OhHenry! Rolo Coffee Crisp Crunch Smarties Goobers Butterfinger Mack Cailler After Eight Turtles
Stouffer's Delissio Hot Pockets
Nestlé Drumstick Mövenpick Dreyer's Parlour
Nerds SweeTarts Laffy Taffy Runts Gobstopper Bottle Caps
PowerBar Carnation Gerber Nesquik Chef-mate
Garnier Vichy Biotherm The Body Shop Ombrelle Maybelline Kiehl's
Clairol Olay CoverGirl
Purina Beneful Cat Chow Dog Chow Friskies Fancy Feast Felix Alpo
Ralph Lauren Giorgio Armani Yves Saint Laurent Stella McCartney Diesel
Lacoste Boss Hugo Boss
Dawn Cascade Downy Zest



# Kiu estas pr


PEPSICO
Kellogg's
MARS
WRIGLEY
P&G
Johnson&Johnson
Unilever
Ocean Spray
SoBe
Dole
Ruffles
Miss Vickie's
Cheetos
Cracker Jack
Fritos
Tostitos
Rold Gold
Sun Chips
Lay's
Doritos
Life
Aunt Jemima
Crispy Minis
Harvest Crunch
Chewy
Quaker
Green Giant
Hamburger Helper
Betty Crocker
Old El Paso
Val Nature
Bugles
Yoplait
Häagen-Dazs
Wanchai Ferry
Pillsbury
Cheerios
Lucky Charms
Chex
Golden Grahams
Cinnamon Toast Crunch
fibre1
Pop-Tarts
Eggo
Kashi
Cheez-It
Nutri-Grain
Corn Flakes
Special K
Müslix
Crispix
Froot Loops
Bran Flakes
Apple Jacks
Raisin Bran
Corn Pops
Frosted Flakes
Vector
Rice Krispies
Just Right
All-Bran
Mini-Wheats
Freedent
5 gum
Wrigley's Spearmint
excel
Doublemint
Juicy Fruit
Big Red
Extra
Hubba Bubba
Orbit
Lifesavers
Starburst
Skittles
Altoids
Whiskas
Pedigree
Royal Canin
Mars
m&m's
Snickers
Milky Way
Maltesers
Dove
Bounty
Twix
Uncle Ben's
Knorr
Maille
Hellmann's
Becel
Imperial
Skippy
Bertolli
Slim-Fast
Pot Noodle
Colman's
Bovril
Good Humor
Breyers
Popsicle
Fudgsicle
Ben & Jerry's
Klondike
Cornetto
Magnum
Salada
Red Rose
Lipton
Dove
AXE
Lever 2000
St. Ives
Suave
Cutex
Noxzema
Alberto
Sunsilk
Salon Selectives
Thermasilk
Just for me!
TRESemmé
VO5
Close-Up
Pepsodent
Q-tips
Vaseline
Comfort
Degree
Pond's
Sunlight
Vim
Sun
Via
Breeze
Splenda
Neutrogena
Clean & Clear
Aveeno
Lubriderm
Visine
Nizoral
OneTouch
Band-Aid
Listerine
Reach
Carefree
Johnson's baby
Stayfree
nicorette
NicoDerm
Tylenol
Reactine
Motrin
Pepcid
Sudafed
Imodium
Polysporin
Benylin
Benadryl
Rolaids
IAMS
Tide
bounce
cheer
Gain
Ivory
Joy
Mr. Clean
Febreze
Swiffer
Puffs
Bounty
Comet
Oral-B
Crest
Scope
Fixodent
Pepto-Bismol
Vicks
Metamucil
head & shoulders
infusium 23
Pantene Pro-V
natural instincts
Gillette
Old Spice
Secret
Tampax
always
Pampers
Charmin
Cushelle
Duracell
PUR
Braun

# ...roprietulo ?

# SENVORTE


© 2014 Tom Richmond








www.steverobertscaricatures.co.uk




KING




latif fityani




AUTOFEEDER
MEDS
STEVECUTTS.COM

# La elektita nacio

**Jen 13 kialoj per kiuj oni povas konstati, ke la poloj estas elektita nacio.**

*1. Kiel la unua nacio en la mondo poloj prilaboris metodon drinki diversspecajn likvaĵojn enhavantaj akoholon, sed ne destinitaj por drikado fare de homoj.*

*2. Iu enterigisto el Krakovo havis en la sango 9.5 elmilojn da alkoholo kaj … travivis.*

*3. En 1995 unu el la loĝantoj de Vroclavo atingis absolutan medicinan mondrekordon - 14.8 elmilojn da alkoholo en la sango! Nia heroo superis trifojan, mortigan dozon. Li mortis pro vundoj ricevitaj dum aŭtoakcidento, kiam li estis sobra.*

*4. En okcidenta Eŭropo oni povas trovi alkoholojn kun averta surskribo:*

**„La mortiga dozo – 3,5 elmilojn; ne koncernas la poloj kaj rusoj".**

*5. Pollando aĉetas sablon kaj gruzon el Sud-Afriko.*

*6. Iu pola reprezentanto pri korpokulturado 500-foje superis la medicinan dozon de testosterono, kia troviĝas en la korpo de sana viro.*

*7. Wladyslaw Reymont, pola verkisto, aŭtoro de la libro „Chlopi/Kamparanoj", ne vojaĝis en 1924 al Stokholmo por preni aljuĝitan Nobelpremion, ĉar li ne povis sobriĝi. La verkisto mortis unu jaron pli poste pro alkoholismo.*

*8. Poloj kun kancero de laringo, eltrovis metodon fumi tra tubeto enmetita en traĥeon.*

*9. Marte en 2000 dum la ĉasado je tigro, kiu forkuris el cirko, sur la stratoj de Varsovio oni mortpafis veterinaron.*

*10. Inter honoraj civitanoj de Vroclavo ĝis nun oni povas trovi Adolf Hitler, Joseph Goebbels kaj Herman Goering.*

*11. Loĝanto de la urbo Nowe Miasto Lubawskie dufoje forkuris el prosektorejo. La viro estis tiom ebria, ke donis neniun vivsignon, do la kuracistoj konstatis lian morton.*

*12. Loĝantino de la urbo Piotrków Trybunalski estis kondamnita por trijara maliliberigo. Dum dek jaroj ŝi evitis malliberigon ĉiujare gravediĝante.*

*13. En 1998 oni malkovris en Vroclavo fabrikon de falsaj usonaj centdolaraj monbiletoj. La usonaj fakuloj el* **Secret Service** *taksis, ke tiuj estis plej bone faritaj falsaĵoj en la mondo. Iliaopinie, la falsaj dolaroj estis pli zorgeme faritaj ol veraj monbiletoj.*


**Ĉu vi jam scias ?**
**ke la poloj estas elektita nacio.**
**Ili estas agloj ! eĉ se sen krono**












# Novaj Mondoj











**Astronomoj neniam antaŭe vidis ion similan: sep Ter-grandecaj ekzomondoj orbitas la saman etetan malhelan stelon, kaj ĉiuj el ili eble kapablas subteni la vivon kiel ni konas ĝin, raportas nova studaĵo.**

*"Serĉante la vivon ekster-Tere, tiu ĉi sistemo estas probable nia plej bona veto,"* diris en eldiraĵo la kun-verkisto de la studaĵo, Brice-Olivier Demory, profesoro ĉe la Centro por Spaco kaj Loĝebleco ĉe la Universitato de Bern en Svislando.
La ekzoplanedoj cirklas la stelon TRAPPIST-1, kiu forestas de Tero je nur 39 lumjaroj — nur ŝtonĵeto en la kosma skalo. Do, hipotezoj pri la kapablo por viv-subtenado de la ekzomondoj devus baldaŭ esti informitaj far malmolaj datumoj, diris stud-teamanoj.

*"Ni povas anticipi, ke, en kelkaj jaroj, ni scios multe pli pri tiuj ĉi planedoj, kaj espereble, se ekzistas la vivo tie, [ni scios] ene de jardeko,"* diris kun-verkisto Amaury Triaud de la Instituto de Astronomio ĉe la Universitato Cambridge en Anglujo al raportistoj je mardo (Feb. 21).

**Strangega Ekzosistemo**

TRAPPIST-1 estas ultramalvarmeta nano-stelo nur ete pli granda ol la planedo Jupitero kaj preskaŭ 2,000 fojojn pli malhela ol la suno.
La reserĉo-teamo, estrata far Michaël Gillon de la Universitato de Liège en Belgio, originale studis la stelon uzante la teleskopon nomitan anglalingve **"TRAnsiting Planets and PlanetesImals Small Telescope (TRAPPIST)",** instrumento ĉe la Observatorio La Silla en Ĉilio. (Tio ĉi eksplikas la komunan nomon de la stelo; la teĥnika nomo estas 2MASS J23062928-0502285.)
TRAPPIST-o trafis regulajn malheliĝ-eventojn, kiujn la teamo interpretis kiel indikaĵojn de tri planedoj transirantaj, aŭ transitantaj, la vizaĝon de la stelo. En majo 2016, Gillon kaj siaj kolegoj anoncis la ekziston de tiuj ĉi ekzomondoj, nomitaj TRAPPIST-1b, TRAPPIST 1-c, kaj TRAPPIST 1-d. Ĉiuj tri, raportas la teamo, havas pli-malpli la grandecon de Tero kaj eble kapablas subteni la vivon.
La astronomoj studadis la sistemon, uzante TRAPPIST-on kaj kelkajn aliajn teleskopojn sur la Tero. Tiu ĉi sekvada laboro sugestis, ke la supozitaj transitoj de TRAPPIST 1-d estis fakte kaŭzitaj far pli ol unu planedo, kaj ankaŭ revelaciis indikaĵojn de pliaj eblaj mondoj en la sistemo.
Tri-semajna observada kampanjo per la Spac-Teleskopo Spitzer de NASA en septembro kaj oktobro 2016 helpis klarigi ĉion-ĉi. La transit-datumoj de Spitzer konfirmis la ekziston de planedoj b kaj c, sed revelaciis, ke tri planedoj respondecas por la signaloj originale detektitaj el "TRAPPIST-1d." Kaj Spitzer ankaŭ trafis du pliajn ekzoplanedojn en la sistemo, do entute sep.
Tiuj ĉi sep mondoj — kiujn Gillon kaj siaj kolegoj anoncis en la nova studaĵo eldonita Interrete hodiaŭ (feb. 22) en la ĵurnalo Nature — estas ĉiuj proksimume Ter-grandecaj. La plej malgranda estas preskaŭ 75 procente tiel masiva kiel Tero, dum la plej granda estas nur 10 procente pli masiva ol nia planedo, la reserĉistoj diris.
*"Tio ĉi estas la unua fojo kiam tiom da ĉi-tipaj planedoj estas trovitaj ĉirkaŭ la sama stelo,"* Gillon diris en la marda novaĵ-konferenco.
Ĉiuj sep ekzomondoj okupas stel-proksimajn orbitojn, cirklante pli proksime al TRAPPIST-1 ol Merkuro al la suno. La orbit-periodoj de la plej enaj ses mondoj varias je 1.5 tagoj ĝis 12.4 tagoj; la plej fora planedo, nomita TRAPPIST-1h, estas pensata kompleti unu orbiton en preskaŭ 20 tagoj. (Spitzer trafis nur unu transiton de TRAPPIST-1h, do ĝia orbita pado ne estas bone sciata.)
La ses enaj planedoj estas preskaŭ en resonanco, signifante, ke iliaj orbitaj periodoj estas interrilataj unu kun la aliaj per rejŝoj de du malgrandaj entjeroj. Tiu ĉi aranĝo sugestas, ke la mondoj formiĝis pli distance en la sistemo, kie akvo probable estis abunda, kaj tiam migris al siaj nunaj pozicioj, diris studaĵ-teamanoj.
Datumoj kunigitaj pere de la pluraj teleskopoj sugestas, ke ĉiuj ses enaj planedoj estas ŝtonecaj, samkiel la Tero; oni ne sufiĉe scias pri planedo h por determini ĝian kunmeton.

## Loĝeblaj Mondoj?

Ĉar la sep ekzomondoj orbitas tiel apude, ili probable estas ĉiuj tajde ŝlositaj, diris Gillon. Tio estas, ili probable ĉiam montras la saman vizaĝon al sia stelo, samkiel la Tera luno montras al ni nur la “proksiman flankon.”
La reserĉistoj aldonis, ke fortaj gravitaj tiroj, kaj el TRAPPIST-1 kaj el najbaraj planedoj, povus signife hejti la planedajn internojn, rezultante en multe da vulkanismo, precipe sur la du plej enaj mondoj.
La reserĉistoj aldonis, ke fortaj gravitaj tiroj, kaj el TRAPPIST-1 kaj el najbaraj planedoj, povus signife hejti la planedajn internojn, rezultante en multe da vulkanismo, precipe sur la du plej enaj mondoj.
Malgraŭ ĉi tiaj ecoj — ekstrema proksimeco al ilia stelo kaj tajda ŝlosilado — la sistemo TRAPPIST-1 estas esperiga loko por elserĉi ekzovivaĵojn, diris studaĵ-teamanoj.
TRAPPIST-1 estas tiel malhela kaj malvarmeta, ke ĝia “loĝebla rango” — tiu precize ĝusta rango de distancoj kie likva akvo povus ekzisti — estas tre proksima al la stelo. Kaj, oni pensas, eĉ tajde ŝlositaj planedoj estas loĝeblaj se ili havas atmosferojn, kiuj povas transporti hejton el la taga flanko al la nokta flanko, diris Gillon.

*“Oni havus nur [temperaturan] gradienton, sed tio ne estas katastrofa por la vivo,”* li diris.
Modelada laboro far la teamo ja sugestas, ke tri el la sep TRAPPIST-1-aj planedoj (e, f, kaj g) estas en la loĝebla rango. Kaj estas eble, ke, donate la ĝustaj atmosferaj kondiĉoj, akvo — kaj tial la vivo kiel ni konas ĝin — povus ekzisti sur ĉiuj sep.
Modelada laboro far la teamo ja sugestas, ke tri el la sep TRAPPIST-1-aj planedoj (e, f, kaj g) estas en la loĝebla rango. Kaj estas eble, ke, donate la ĝustaj atmosferaj kondiĉoj, akvo — kaj tial la vivo kiel ni konas ĝin — povus ekzisti sur ĉiuj sep.
Tia spekulado estas prepara, li kaj aliaj teamanoj emfazis; pli da datumoj estas bezonataj antaŭ ol oni povos fidoplene juĝi pri la planedaj loĝeblecoj. Tia laboro jam ekiĝis. Ekzemple, la teamo studis la atmosferon de la mondoj per la Spac-Teleskopo Hubble de NASA. Detala karakterizado — kaj la serĉo por tiaj signoj de ebla vivo, kiaj oksiĝeno kaj metano — devos atendi ĝis kiam pli potencaj instrumentoj venos surlinien, diris Triaud. Sed tiu atendo povus esti ne longa. La $8.8 miliarda Spac-Teleskopo James Webb estas laŭplane lanĉota en malfrua 2018, kaj grandegaj, kapablaj, surteraj teleskopoj kiel la Eŭropa Ekstreme Granda Teleskopo kaj la Giganta Teleskopo Magellan estas planataj veni surlinien en la fruaj ĝis mezaj 2020-oj.

*“Mi pensas, ke ni faris gravegan paŝon al la eltrovo de ĉu ekzistas la vivo tie,”* diris Triaud. *“Se la vivo sukcese viglis tie kaj ellasas gasojn similajn al tiuj, kiujn ni havas sur la Tero, tiam ni scios.”*
La sistemo TRAPPIST-1 estas almenaŭ 500 milionjaraĝa, sed ĝia aĝo ne povas esti sciata pli precize ol tio, Gillon diris. Oni ĝenerale pensas, ke ultra-malvarmetaj nano-steloj kiel TRAPPIST-1 povos travivi dum 4 aŭ 5 bilionoj [1012] da jaroj — preskaŭ milfoje pli longe ol sun-similaj steloj.

### Ekzoplaneda Ĉielrigardado

Se estus vivoformoj sur unu aŭ pli de la mondoj de TRAPPIST-1, kion ili vidus? Pro la stela malheleco, eĉ la tagotempaj ĉieloj neniam iĝus pli brilaj ol tiuj de la Tero ĵus post sunsubiro, Triaud diris. (Tamen, la aero estus varma, ĉar plejparte la lumo de TRAPPIST-1 estas elradiita en la infraruĝaj, ne videblaj, ondolongoj.) Kaj ĉio estus trapenetrata en pli-malpli salm-kolora lumo.
“*La spektaklo estus bela, ĉar de tempo al tempo oni vidus alian planedon, eble duoble pli grandan ol la Tera luno, en la ĉielo, depende je kiu planedo vi estis sur,”* Triaud diris.
Estonta laboro eble helpos determini ĝuste kiom oftaj estas tiaj ŝajne ekzotikaj vidaĵoj proksime al la suno.
*“Preskaŭ 15 procento de la steloj en nia najbarejo estas tre malvarmetaj steloj kiel TRAPPIST-1,”* diris Demory en la sama eldiraĵo. *“Ni havas liston de preskaŭ 600 celatoj, kiujn ni observos en la estonteco.”*

















# Kial Usono fariĝu JAPANIO (3)

de Barry Friedman

kontinuo el antaŭa numero

***Mia patro estas en la urbo hodiaŭ***, *vizitis la Mezokcidenton por la vintraj ferioj. La okazo de Kristnaskaj lumoj brilantaj en ĉiu hejmo en ĉiuj apudaj najbarecoj kie tiuj supozeble kristanaj familioj festas la tagon de la naskiĝo de Jesuo Kristo .*

*En realeco tamen neniu scias la veran naskiĝtagon de Jesuo. Kaj la ferio de Kristnasko devenas de Saturnalio, la romia pagana festo, al la nord-Eŭropaj paganaj festoj en la vintro koncernante arbojn kaj lumojn kaj donacojn. La veraj kristanoj, ekzemple la Eklezio de Lasttagaj Sanktuloj, Septagaj Adventistoj, Ates-tantoj de la Eternulo, rifuzas partopreni en tiu fiasko. Sed observu! Tuta lando, la Usono, trompita de falsa pagana festotago. Sed por la resto de ni, kiuj ne estas trompitaj, ni ricevas tempon for de laboro kaj lernejo, manĝoj ĉe ĉinaj bufedoj, ĉar la ĉinoj estas sendiaj komunistoj kiuj observas neniajn religiajn feriojn kaj havas neniujn konscidubojn pri la malfermiĝo je Kristnasko, Pasko, Pesaĥo, Ĥanukao, Novjara Tago, Kwanzao, Ramadano, la listo daŭras kaj daŭras. Mia patro estis loĝanta en urbeto en orienta Novjork-Ŝtato, ĝuste kie la limoj de Konektikuto kaj Masaĉuseco "konekti" en "Masa" maniero, pardonu la provon ĉe malbona vortludoj.*

*Kiel mi ja avertis la leganton multe foje, mi estas iomete mem-indulgema. Tio tamen ĉiam kreas la plej bonan literaturon. Forgesu Hemingŭaj-on kaj minimalismon, brakumi Victor Hugon kaj Herman Melvill-on. Adoru la centojn da paĝoj de tangentoj pri parizaj kloakoj, 19-a-jarcentan usonan balenĉasadon kaj ĉiujn eblajn detalojn de balenoj, ĉiujn eblajn detalojn de franca Katolikismo kaj klerikaro kaj la Latina, catholicam ad nauseum, en nomini Patris et Filii et Spirtuo Sancti: Amen. Gloria en Excelsis.*

*Mi amas esplori lingvojn. Mia patro ne. Li estas sciencisto. Li vivas por la kemio, fiziko, biologio, neŭro-scienco, bio-fiziko, anatomio, astrofiziko. Al kie ajn la limoj de scienco povas puŝi, li estas preta grimpi la monton al la supro de Olimpo. Esti Greko kaj Romia Dio de scienco, Zeŭso de la Neŭrono, Hércules de Plutonio. Li estas pli aĝa Nord-orienta sinjoro, kiu estas polurita de vivo en Teksaso kaj la Mezokcidento. Miksu la neŭrozon kun la vakero. Kaj oni havas veran usonanon. Li batalas la judan patrinon kaj la Ĉerokon. Mallonga griza hararo, malalta figuro kun tio, kion adoleskantoj en Usono hodiaŭ nomas "vir-mamoj." Liaj oreloj ĉiam malboniĝas. Ĉiu alia frazo, kiun li eldiras, kutime finiĝas,* "Kio? Kio?! KIO?! Mi NE BEZONAS FONOFOROJN! "*Sed li estas mia patro. Sen lia penado mi ne estus vivanta skribi ĉi rakonton por via ĝuo kaj plezuro. Tiel vi danku lin por la estonteco de la usona literaturo.*

*La tago komenciĝis simple. La plano estis tre baza kaj minimuma; mia nuna aŭto, kiu estas nova kaj kiun mi posedis nur du monatojn, estis havanta kelkajn malgrandajn problemojn, aŭ pli ĝuste mi opiniis, ke ili estas malgrandaj tiutempe. Ekhaltanta, kontrolu-motora lumo ekbrilanta, bontenado bezonata, la pedalo estas ŝanceliĝanta, la aŭto ne irus rapide sur la senfinaj ŝoseoj en la urbo kie mi loĝas, Ŝoseoj 270, 315, 70 Okcidento, 670 Oriento al la flughaveno, la Toyota-a Korolo, griz-arĝenta japana híbrida miro-aŭto.*

*La japanoj gajnis tiom da mono per la vendado de siajn teruraj aŭtoj al Usonanoj, ke estas malfacile kredi, ke la Usono faligis du atomajn bombojn sur ilia lando kaj murdis centojn da miloj de liaj senkulpaj civiluloj per tio, kio estas verŝajne la plej granda terorisma ago en la historio de la homaro. Forgesu 9/11-on aŭ Benghazi-on aŭ la Oklahomao-urbaj bombadoj. Kiuj estas la veraj teroristoj en la mondo? Sed mi fortunas. La problemoj kun la Toyota-a Korolo; la antaŭa maldekstra pneŭo sur la ŝofora flanko estis tuŝaĉita, ĉu per akcidenta frapado kun najlo aŭ eble kazo de vandaleco. Neniu iam scios la veron. Sed la pneŭo estas plata, neniom da aero estas subtenanta la suban bazon, ne eblas funkciigi la aŭton ien longtempe.*

*Kion fari, kion fari? Mia patro, la mastro-menso, Hedero-Ligo-edukita, bone vojaĝis en Italio kaj Svislando kaj Meksiko, flua en la hispana kaj la mandaren-ĉina kaj la jida kaj la svahila, decidas, ke li mem ŝanĝos la platan pneŭon kun la ekstra pneŭo kiu kuŝiĝas oportune en la kofrujo. Vera vireca viro, vera simbolo de la vakero kun la intelekta usona hibrido, kiun mi adoras tiom. Li starigas la ilojn, la ekstran pneŭon, la ŝtraŭbingojn, la naboĉapon, la*

krikon, la krankon. Post la eltiro de la ŝtraŭbingoj el la originala pneŭo, li estas preta instali la duan pneŭon. Kompreneble oni bezo-nas suprenkranki ĝis la aŭto estas sufiĉe alta por enplanti la ekstra pneŭo. Ĉiu scias tiun bazan fakton. Do ek. Sed estas kaoso. Ĉiufoje mia patro metas la krikon sub la aŭto kaj krankas al pli alta alto, la aŭto subfalas kaj moviĝas malantaŭen.

"Haltu!" krias mia patro. "Kial la infero ĝi ne restos ankoraŭ?"
"Eble la ..."
"ŜŜŜŜ!! Mi laboras ĉi tie! "
"Mi nur provas helpi ... "
"Mi pripensas, estu trankvile!"

Jen kutima konduto de mia patro. Li ne estas la plej pacienca individuo kiam li klopodas fini projektojn koncernantaj mekanikojn, praktikecojn, ilojn, novigojn. Mi devas esti pacienca kaj obeema kaj nur ĝisatendas ĝis li plenumas siajn celojn, tre kiel Geisha-virino al kliento. Li faras multajn ripetitaj provoj por simple igi, ke la aŭto restadas supre. Sed la kriko, flaveta iomete superdimensia ilo kiu ne estas kongrua kun la angulo kaj la deklivo de la enveturejo en kiu la Toyota-a Korola-o estas metita, rifuzas kunlabori lasi mian patron kompletigi la mision de simpla pneŭo-ŝanĝo.

Ni troviĝas en enveturejo en antaŭurba najbareco en kurioza agrabla strato de unu-etaĝa domoj kun lignaj pintoj, blankaj leterkestoj, Kristnaskaj lumoj de bluaj kaj rozkoloraj kaj blankaj kaj oranĝaj kaj Avo-frostaj eltranĉaĵoj, malgrandaj kamionoj kaj ĉiaterenaj aŭtoj kaj aliaj Toyota-oj kaj Honda-oj, blankula-rubemaj bebopatrinaĉoj marŝante siajn infanojn en la bebocaretoj post la kolektado de registaraj ĉekoj ĉar por ĉiu bebo, kiun oni elpuŝas eksteren, la registaro donas pli da mono.

La tago estas malvarmeta kaj freŝa kaj bonodora kun aera klara vintrema veneto kiel la speco kiu estas la trankvilaĵo antaŭ la ŝtormoj de Ohio inter novembro kaj majo. De neĝ-kaj-hajlaj koŝmaroj kiuj paralizas la tutan loĝantaron en senfina trafiko kaj akcident-katastrofoj al la speco de tagoj de klara videbleco kiam la sola defio estas plenkovri la korpon por eviti la osto-malvarmegigantan malvarmegon kiu drenas ajnan ĝojon aŭ optimismon de la averaĝa civitano de tiuj nordaj ebenlandoj, kie iam loĝis la Siuoj, tiam la britoj kaj francoj, tiam la germanaj farmistoj, tiam la urbaj areoj de orient-eŭropaj enmigrintoj kaj la nigruloj el la Sudo por eskapi sklavecon.

Tio estas Ohio, tiu estas Usono, ĉiuj estas konstante leviĝantaj leviĝantaj leviĝantaj, nur esti prokrastita per simpla loko kaj taktika eraro kun la kriko. Kiel mia patro. Li estas senfine frustrita.

"Mi ne povas igi, ke la aŭto estas premfiksita konvene. Ĝi falas. Ĝi falas! Kion ni faros?! Kion ni faros?! Ni devas rebonigi la aŭton! Oni ne povas ne havi aŭton en Usono!"
"Tial Usono fariĝu Japanio," mi aldonas per sarkasma maniero. Mia patro ne amuziĝis. Nun ne estas la tempo aŭ loko por ŝercoj kaj kaŭsticaj observoj.
"Silentu kaj elpensu tion, kion ni faru! Kiujn ni telefonu? Kiujn ni telefonu ?! "
"Nu, cxu vi memoras, ke ni havas asekuron kiu pritraktas ĉiajn problemojn. Eble ni povas venigi iun ĉi tien por ripari ĝin. Ĉu vi memoras?" La lumo ŝaltiĝas en sia super-ŝarĝita cerbo. Li malstreĉiĝas senprokraste de sia mania stato.

"Ho jes. Telefonu ilin." Mi poste telefonas la asekuro-krizo-vojflankan servon per mia malnova Verizon-a telefono. Kompreneble ĝi estas nur malgranda preskaŭ-nenio kompare al modernaj telefonoj. Mi ne povas vidi filmojn sur ĝi aŭ fari videojn aŭ premi iun butonon por ricevi retpoŝtojn, kontroli bankokontojn, kontroli fejsbuko ene de sekundoj, legi pri filmetoj, famuloj, sandviĉoj , trinkaĵoj, politikaj argumentoj pri Trumpismo kontraŭ Klintonismo, retpoŝtaj skandaloj kaj malaminda retoriko pri islamanoj kaj latinuloj en Usono farante ĉiujn problemojn. Sed la telefon-vokoo trairas. "Dankon por la voko al asekuro-krizo-vojflanka servo," respondas nazema agaca ina voĉo kiu sonas kiel miksaĵo de Novjorka kaj Suda. "Se vi telefonas por posttreno aŭ aliaj servoj, bonvolu premi unu. Para servicia en espanol, marque numero dos. "Ne, mi ne volas servon en la hispana. Tio estas Usono, diable! Ni volas la anglan! Ni batalis Meksikon preni Kalifornion, Arizonon, Nov-Meksikon, ktp for de ili por ne havi la hispanan en la lando!

**daŭrigota**























## Mi ne scias kial ĉiuj subaj ŝercoj estis markitaj en mia dosiero kiel "La anekdotoj de IJS"

*(mi scias, ke estas hontinde, sed ili plaĉas al mi)*

***En la vendejon*** *de maljunulino eniras adoleskanto.*
*- Bonan tagon... Ĉu vi rekonas min???*
*- Do...*
*- Ĉu vi certe ne rekonas min???*
*- Hm...*
*- Ĉu vi ne scias, kiu mi estas??? Rigardu min bone!!!*
*- Ne... Ne... mi jam estas maljuna... mia memoro... KIU VI ESTAS???*
*- MI ESTAS la aĉetanto!!!*

***Vulpo renkontiĝas*** *kun la hundo:*
*- Hej, hundo, kial vi havas rostron?*
*- Kio? Pardonu, mi kredis, ke mi estas elefanto...*

***En la angulo estas io****, kaj ĉiam pli ruĝiĝas, kio estas tio?*
*- Bebo ludas kun razilo.*

***Mi nur pigre skrapas***
*mian orelon per najlo...*
*... "Subite: silento"...*

***Infano kuras en la*** *vendejon, kaj haste diras:*
*- "Du kilogramojn da brasikoj, tri kilogramojn da terpomoj, kaj atentu, ke la olda putino ne puŝu la pesilon per la fingro".*

**Du putinoj staras en** *lifto: - Hej, kiom forta odoro de ĉuro!*
*- Pardonu, mi nur ruktis.*

***Du kadavroj*** *interparolas:*
*- Ho, rigardu, putriĝas miaj intestoj!*
*- Mi ne vidas tion, mia okulo ne tiun direkton fluas...*

***Du arbohakistoj hakas*** *la arbon, subite unu dehakas la kruron da la alia.*
*- Ho, ĉu tiu ĉi estis ŝerceme aŭ serioze?*
*- Serioze.*
*- Bone, ĉar por ŝerco ĝi estintus tro kruda.*

***Skeleto en arbusto****, kio estas tio?*
*La venkinto de la pasintjara kaŝludo...*

***Dum milito*** *du knaboj promenas en la urbo. Ili ekvidas kapon sur la tero.*
*- Rigardu, ĉu ne Johano estas tiu?*
*- Ne, li estas pli alta.*

*-* ***Ĉu vi preĝas*** *antaŭ manĝado?*
*- Ne, mia panjo kuiras bone.*

***Kuracisto aliras***
*malsanulon post la operacio:*
*- Mi havas unu bonan kaj unu malbonan novaĵon por vi.*
*- Ho, bonvolu komenci kun la bona.*
*- Via peniso pro la operacio en trankvila stato daŭras ĝis la tero?*
*- Bonege! Kaj la malbona?*
*- Vi ne havas piedojn.*

***Kial estas bone al***
*graveda virino?*
*La pordo neniam batiĝas al ŝia nazo.*

***Kial oni eldonas*** *poŝtmarkojn kun bildo de politikistoj?*
*Pro tio, ke oni eĉ post ilia morto povu leki al ilia postaĵo.*

*-* ***Kio estas bona*** *en la patrina lakto?*
*- ???*
*- La pako!!!*

*-* ***Panjo, kiel povas*** *esti, ke mi estas nigra, kaj nek vi nek paĉjo estas nigra.*
*- Ho, mia filineto, post tiom granda amuziĝo vi eĉ hundo povus esti.*

*-* ***Kie vi lernis naĝadon?***
*- En la akvo.*

***- Doktoro, se mi puŝas***
*mian ŝultron, tio doloras.*
*- Se mi puŝas la frunton, ankaŭ tio doloras.*
*- Se mi puŝas la piedon, ankaŭ tio doloras.*
*- Via fingro estas rompita!*

***Al kuracisto vespere***
*alvenas afrika malsanulo.*

*- Doktoro, tre doloras mia orelo.*
*- Senvestig'u.*
*- Sed doloras ja mia orelo!*
*- Bone, bone, senvestiĝu.*
*La malsanulo senvestiĝas.*
*- Nun genuu.*
*- Sed doloras ja mia orelo.*
*- Kaj mi petas, ke vi genuu, kaj rampu sub la fenestron.*
*La malsanulo faras tiel.*
*- Kaj nun rampu apud la ŝrankon.*
*Ankaŭ tion li faras.*
*- Dankon, nun vi povas vestiĝi kaj foriri.*
*- Sed doktoro, kio okazos kun mia orelo.*
*- Mia jam finis la laboron. Mi nur estis scivola pri tio, kien meti la novajn nigrajn fotelojn.*

# FREŜA MAGIA KVADRATO


nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin

1. **agado kontraŭ minaco............**
2. **eldonist' ................................**
3. **plenumita .............................**
4. **kortega ceremoniar' ................**
5. **skriba informeto ....................**
6. **fadenformaj metalaĵoj ............**

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |

**Kiumaniere vi solvos krucvortenigmon**

Unue oni devas iomete pripensi !
Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn!
Per sageto eniru kvadrateton kaj musklaku ĝin
(per maldekstra puŝbutono).
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvad-rateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato - iru al la lasta paĝo... SED...
Unue vi devas iomete pripensi...




*Solvo de supra enigmo estas simpla nur por 50% da homoj.*
*Kaj ĉu por vi ?*











# ZAMENHOF – LA HOMO DE EPOKOJ

***Mi tralegis la libron de Aleksander Korĵenkov „La vivo, verkoj kaj ideoj de doktoro L.L. Zamenhof".***

*Ege interesa libro, kiu traktas Zamenhofon nur laŭ la dokumentoj kaj do, donas vere tre objektivan aliron al lia agado kaj evoluo. Min aparte interesis lia filozofia penso kaj volis informiĝi pri hilelismo/ homaranismo kion mi ĝis nun ne esence konis. Kaj mi do atingis jenajn konkludojn.*

*Zamenhof antaŭ la 20-a jarcento ĉefe dediĉis sin al Esperanto kaj interna ideo. Li mem ne sciis difini ĝin. Lia difino fine de lia vivo tekstis en enkonduko al la Deklaracio pri homaranismo en 1913 „...dum la esenco de Esperanto estas politike kaj religie absolute indiferenta kaj la interna esperantista ideo prezentas nur nedifinitan fratecon, senton kaj esperon, kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ĝin,..."*

*Pli malpli ekde 1900 li komencis intense okupiĝi pri io plia: ideologio kiu kondukus al lia baza celo, nome al kreo de socio kiu agados por unuiĝinta homaro. Tiu ideologio eliris el lia forta konvinko ke la bazo por humanismo estas starpunkto: „Agu al aliaj tiel kiel vi ŝatus ke aliaj agu al vi", kion li atribuis al juda profeto Hilel.*

*Pro tio li nomis sian konscian ideologian celaron la hilelismo. Tiu hilelismo evoluis de komenca ideo influi al judaro kaj helpi ilian problemon ĝis krei idean bazon por la komuneco kaj unueco de la homaro. Ĉar la hilelismon sufiĉe akre kontraŭstaris la esperantistoj, li ĝin iom pliĝeneraligis kaj nomis homaranismo. Esence oni povas diri ke li obsede ĝis sia vivofino volis krei movadon de homaranoj kiu celus unuecan homaron. Komence al tio ĉiam eslis ligita Esperanto: Homaranoj devus uzi neŭtrale homan lingvon en interpopola komunikado, kaj en la fina fazo, li tute ne plu menciis Esperanton. En sia juneco li starigis tezon ke la interpopolan (li ĉiam tion nomis „intergenta") malamon kaŭzas manko de komuna lingvo kaj diverseco de religioj. Pro tio li longatempe ligis tion kune kaj batalis por Esperanto kaj serĉis solvon por unueca neŭtrala tuthomara religio. Lia homaranismo estis ĝuste tio: serĉo de homara neŭtrala religio kaj li ankaŭ daŭre parolis pri ties temploj.*

*Ambaŭ tiuj tezoj estas laŭ mi utopioj nerealismaj. La homara socia leĝaro enhavas la neprecon de mullingvismo kaj ne ekzistis homaro unulingva, nek ĝi estas ebla. Same pri religioj. Inkluzive de ateismo, kiu same estas religio kredanta ke klasika dio de religioj ne ekzistas, sed kredanta ke estas iuj naturaj fortoj.*

*Baze de tio oni povus konkludi ke li kreis ion kio estas malebla, kion cetere ankoraŭ nuntempe multaj neesperantistoj kredas. Tamen, ni bone scias ke sekvoj de lia agado kaj liaj ideoj estas tre realaj kaj signifaj en la mondo. La sekvo ne estas la lingvo mem, sed la ekzisto de la movado kiu similas al kiu ajn diaspora popolo. Li mem ne konsciis kaj pri tio fakte la esperantistoj ankaŭ nuntempe ne konscias ke tio kion li kreis estas perfekta ligo inter lingvo kaj ideologio.*

*Tiu ligo ebligis ke nur Esperanto inter ĉiuj „artefaritaj" lingvoj ekvivis. Li vane batalis por morte naskita monda religio, sed ne sciis ke li ĝin jam kreis samtempe kun la lingvo. La grandiozeco de lia laboro ne estis nur intuicia bonega praktika lingva kodo, sed la ideologio kiun li intuicie esprimis en siaj komencaj poemoj. Li neniam konsideris tion, kion li esprimis en siaj poemoj, ideologio sed pensis ke tio estas komenco de esperanta poezio.*

*Legu la "Esperon", "Al la fratoj", "Preĝo sub verda standardo", "La vojo", "Mia penso", "Al la esperantisto"... temas pri tre klaraj programpoemoj kaj kantoj. Ne hazarde esperantistoj kun entuziasmego kantis la himnon kaj faras tion ankoraŭ nun kaj citis liajn poemojn ĉie kaj ĉiam.*

*Tiel eblas klarigi ankaŭ la fenomenon de eternaj komencantoj. Esperantisto ne devas bonege koni la lingvon, sed li devas koni la sloganojn de liaj poemoj. Tiuj ideologiprogramaj tekstoj kreis la homgrupon kun komuna ideologio: la zamenhofa interna ideo, prezentita en deko da liaj poemoj. Lingvo estas lingvo nur tiam kiam ĝin uzas homgrupo ligita per komuna ideologio kaj kulturo. Pro tio ke ekde la komenco mem la lingvo estis ligita al socia programo (Ni rompos la murojn de miljaroj, kreos novan homaron...) Zamenhof ne konsciante kreis novan popolon kun celo kiu lin mem puŝis al insista kreado por forigi la malamojn intergentajn kaj kontribui al la monda paco. Li do ne konciis ke la ideologio, kiun li volis krei per siaj hilelismo/homaranismo jam ekzistis de la komenco: la interna ideo, difinita en la poemaro. Oni do povas konkludi: La grandioza atingo de Zamenhof estas popoleto diaspora kiu per sia ideologio batalas kontraŭ malamo intergenta, preta je fordono de sia lingvo al la mondo, kiam tiu estos preta akcepti ĝin. Li do ne kreis lingvon (tion faris miloj da aliaj ankaŭ) sed homgrupon kun specifa celo kaj neŭtrala, facile lernebla kaj lingvistike genia lingvo.*

*Tiu grupo trairis multajn sociajn krizojn kiel la daŭran batalon kun homoj kiuj ĝin kontraŭis, la problemojn de batalo por pluekzisto en ekstremistaj reĝimoj kaj la krizojn ene de la propraj vicoj, kiel la ido-skismo kaj pluraj problemoj pro lingvoreformistoj. Intertempe tiu socio kreis rimarkindan kulturon, pri kiu ĝi mem povas fieri kaj plukredi pri la propra valoro.*

***La popoloj kiuj havas fortan kredon pri sia propra valoro ne malaperas, eĉ se ili troviĝas sub la plej teruraj perfortoj. Tial E-popolo plu ekzistas kaj ekzistos ankoraŭ longe.***

*Zlatko Tišljar*
*"Eŭropa Bulteno"*
*http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno*

# Juda humuro

**Porke...**
Judo el Odeso sidas en trajno apud oficiro, kiu servas en la rusa armeo de la Caro. La oficiro kondukas porkon. Dum la veturo la oficiro ofte parolis al la porko, sed por kolerigi la judon li nomis ĝin MOJŜE ***(= "Moseo" en la jida lingvo: tipa nomo ĉe judoj, ofte uzita de antisemitoj):*** "Sidu trankvile, Mojŝe!", "Venu ĉi tien, Mojŝe" ktp.
Post certa tempo jam tedis al la judo kaj li diris al la armeano: "Ĉu vi scias, sinjoro oficiro, estas domaĝe ke via porko havas judan nomon!"
- "Kial, judaĉo?"
- "Ĉar se ĝi ne havus judan nomon ĝi povus esti altranga oficiro en la armeo de la Caro!"

**Dio kaj parkado**
Judo veturas en la centro de Jerusalemo kaj serĉas urĝe lokon por lasi sian aŭton. Li ĉirkaŭiras la centron longan tempon, sed senrezulte. Subite, fariĝinte preskaŭ senespera, li levas la vizaĝon ĉielen kaj diras: *"Dio, se vi nun aranĝos por mi parkejon, mi promesas ekde nun observi la Sabaton, manĝi nur laŭ la ritoj de la religio ("Koŝere") kaj observadi la devojn dum ĉiuj judaj festoj".*
Tuj post kiam li finis la frazon li vidas liberan lokon por lasi la aŭton. Ĝoje li tuj rigardas supren kaj diras: ***"Ne gravas jam, mi jam mem elturniĝis"...***

**Ruzrabeno**
Rabeno kaj pastro veturas en la rapidvojo, ĉiu per sia aŭto.
Okazas akcidento: ambaŭ aŭtomobiloj karambolis (koliziis) kaj preskaŭ plene detruiĝis. Sed la du Di-servantoj ("Diamantoj") saviĝis. Ili eliras, staras kune ĉe la vojrando kaj trovas ke nenio okazis al ili.
La rabeno rigardas la alian homon kaj diras: "Vi estas pastro, ĉu ne?"
"Jes", respondas la pastro.
Rabeno: "Okazis al ni vera miraklo. Certe la Eternulo deziris ke ni renkontiĝu kaj fariĝu amikoj".
Pastro: "Povas esti".
Rabeno: "Mi opinias ke ni devas tosti pro nia saviĝo kaj je nia nova amikiĝo. Mi havas hazarde botelon da vino. Espereble ĝi ne estis detruita. Ĉu vi pretas drinki kun mi?"
Pastro: "Kial ne?"
La rabeno alportas el la veturila kofro bonstatan vinbotelon kaj ofertas al la pastro. Tiu ĉi drinkas iomete sed sekve de instigoj de la rabeno, li poste pli kaj pli drinkas. Sed la rabeno tute ne drinkas.
Pastro: "Kial vi ne drinkas ankaŭ?".
Rabeno: ***"Mi preferas unue atendi la policon."***

**Kun policisto**
Dum parto de la 19-jarcento oni ne permesis al judoj ekloĝi en Peterburgo (Leningrado), ĉefurbo de Rusio. Laŭ la leĝo la posedantoj de gastejoj devis informi al la Cara police, dum ne pli ol 12 horoj, pri ĉiu nova alveninta judo. Pro tio judoj kaptitaj de la police kutimis diri, ke ili troviĝas en la urbo dum malpli ol 12 horoj.
Noktomeze alvenis policanoj al unu de la peterburgaj gastejoj kaj kaptis tie kelkajn judajn komercistojn, kiuj ne havis oficialajn loĝpermesilojn.
Dum la gestejestro flustre diskutis kun la ĉefpolicano pri la alteco de la ŝmirmono, sidis la polica oficisto kaj verkis la protokolon. Li demandis la unuan judan gaston:
"Kiam vi venis al la urbo?"
Respondis la homo: "Antaŭ 6 horoj".
"Kaj vi?", li demandis la duan judon.
Respondis li: "Antaŭ 4 horoj".
La tria demandito respondis: "Antaŭ 2 horoj". La kvara: "Antaŭ unu horo".
Ridetis la oficisto kaj diris: "Judaĉoj, ĉiunokte mi aŭdas la samajn respondojn de viaj samgentanoj. Jam tedis al mi ili. Ĉu neniu el vi havas alispecan respondon?"
Respondis la kvina judo: ***"Sinjoro oficisto, mi ankoraŭ tute ne alvenis..."***

**Senpage**
Tio okazis siatempe en Blank-Rusujo (hodiaŭ: Belaruso, Bjelorusio), en la juda vilaĝo.
La bonkora juda kuracisto instalis afiŝon ĉe la pordo de sia kliniketo: "Por malriĉuloj- senpage!"
Venis ĉe li malriĉa virino. Kuracisto: "De kio vi suferas?".
Virino: "Mi tute ne suferas". Kuracisto: "Kial do vi venis al mi?"
Virino: "Ĉar tio tute ne kostas mi diris al mi: kial ne iri por ke la doktoro min kontrolu? Eble li trovos ke mi havas iun malsanon..."











***Karikaturoj sur la paĝo:***
====================
*- 4 - Angela Merkel, Arnold Schwarzenegger, Donald Trump, Delano Rooswelt, Lula da Silva*
*- 5 - Harold Lloyd, Jack Nicholson, John Wayne, Julia Roberts, Luis de Funes,*
*- 6 - Albert Camus, Anton Ĉeĥov, Artur Conan Doyle, Charles Bukovskij, Ernest Hemingway, Gustave Flaubert*
*- 7 - Brigitte Bardot, Merryl Streep, Marlena Dietrich, Sofia Loren,*
*- 8 - Antonio Banderas, Bob Dylan, Elvis Presley, Eric Clapton, Freddie Mercury*
*-9-Jacques Cousteau, Rabindranath Tagore, Sigmunt Freud, Isaac Newton, Stephen Hawking, Vincent van Gogh,*
*- 10 - Angelina Jolie, Charles Bronson, Charlie Chaplin, Chuck Norris, Dustin Hoffman,*
*- 11 - Nelson Mandela, Vladimir Putin, Ronald Reagan, Pele, Giuliani*
*- 14 - Jimi Hendrix, John Lennon, Johnny Halliday, Julio Iglesias, Justin Bieber*
*- 15 - Gerard Depardieu, Pamela Anderson, Peter Falk, Roman Polanski, John Travolta, Woody Allen,*
*- 16 - Lyndon Bain Johnson, Martin Luther King, Papo Francisko, Putin La Unua, Winston Churchill*
*- 17 - Woody Allen, Omar Shariff, Marylin Monroe, Harrison Ford, Dustin Hoffman,*
*- 18 - Leonard Cohen, Louis Armstrong, Madonna, Michael Jackson, Mick Jagger*
*- 19 - Ernest Hemingway, James Joyce, Joseph Conrad, Karol Dickens, Mark Twain, Miguel Cervantes,*
*- 20 - Artur Rubinstein, Giuseppe Verdi, Luciano Pavarotti, Sammy Davies, Sir Paul McCartney*
*- 22 - Umbero Eco, Ivo Lapenna, Istvan Nemere, Edmond Privat, Giorgio Silfer*

**Solvo de magia kvadrato: 1. DEFEND; 2. EDITOR; 3. FINITA; 4. ETIKET; 5. NOTETO; 6. DRATOJ;**

Estimataj samideanoj,

**Bjelovar, la 10-an de marto 2017**

Se vi jam partoprenis iun Esperanto-aranĝon en Bjelovar, vi certe scias kial kroatiaj esperantistoj de jaro al jaro tradicie renkontiĝas tie. Se ĝis nun vi ne havis tian ŝancon, jen bona okazo por vizitas tiun urbon, kiu troviĝas nur 90 kilometrojn for de la kroatia ĉefurbo Zagrebo. Ekde 1909 en Bjelovar Esperanto havas fortan tradicion, kies torĉon nuntempe portas Bjelovara Esperantista Societo (BES). Tiu fakto ankaŭ ebligis, ke por la unua fojo en Bjelovar okazu grava kaj granda Esperanto-aranĝo kun akcentita internacia karaktero kaj tre aktuala temo: Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo.

Tiu "novtipa Esperanta kultura festivalo" INTER-FEST (=Internacia Festivalo) estas parto de Bjelovara kultura somero, aŭspiciita de Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora.

Ĝiaj organizantoj en la Zamenhofa jaro pretigas por vi riĉan kaj diversspecan programon, aparte invitante tiujn esperantistojn, por kiuj la lando de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto estas tro malproksima kaj multekosta. Bjelovar estas facile atingebla, aparte dum la somera turisma sezono en Kroatio, kiu apartenas al pintaj celoj de eŭropa turismo. La organizantoj preparis por vi ankaŭ bonajn loĝ- kaj manĝ-ebleojn, ĉar la kosto de plena pensiono dum la tuta festivala semajno estas ekde 1.750,00 kunaoj / 235 eŭroj.

-----------------------

*Bjelovara Esperantista Societo*
*43000 Bjelovar*
*Vlatka Ma eka 14*
*esperanto.bjelovar@gmail.com*

-----------------------

*Multajn interesajn informojn pri INTER-FEST vi trovos en la speciala festivala retejo: http://www.esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html*

-----------------------

*Ni informas vin, ke la 31-an de marto finiĝas la dua (pli favorpreza) aliĝperiodo kaj invitas vin aliĝi al tiu ĉi unika Esperanto-aranĝo*

*Bajamo NM, la 3an de marto 2017*

*Estimata marian:*
*Saluton, mi serĉas amikinon*
*Mi nomiĝas Ludoviko Eduardo Castillo Estrada. Mi estas komencanto de la internacia esperanta lingvo.*
*Foje mi estis membro de la esperanta movado en mia urbo, sed mi eklernis la juran karieron ĝis la fino pro tio mi ne povis daŭrigi la instruadon de esperanto.*
*Mi diplomiĝis kiel juristo pro tio nun mi laboras kiel konsilisto en ŝtata laborejo kiun apartenas al la ministerio pri agrikulturo. Per li, mi konis pri via adreso. Li proponis min kontakti vin.*
*Mi kredas, ke per mia letero, mi povos eniri en la ponto de la internacia korespondado kun la esperantistoj de mia urbo.*
*Mi feliĉas okaze la nova jaro 2017 por vi kaj via familio pro tio mi deziras al vi sukceson kai bonan sanon, sorton.*
*Amike*
*Ludoviko.*

---

*DIRECCION PROVINCIAL DE CULTURA.*
*http://www.crisol.cult.cu*
*esperanto@crisol.cult.cu*